

Ora Ĵurnalo

Numero 30, Junio–Julio 2020



Al la tuta mondo:

Bonvenon al la **verda Gotenburgo!**

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo


Enhavo	2	El la Lingvo Internacia junio–julio 1896	30
Pri Ora Ĵurnalo	2	Ferenc Jáki, 1919–2010.....	30
Espeporko meditas.....	3	Traktato pri kato.....	31
Pluku librojn.....	4	Transpiranto	32
Manskribo aŭ maŝinskribo?	6	Ludantaj pensiuloj	34
Latinaj citaĵoj	6	Somera ludo – boule... aŭ petanque.....	35
En Korona tempo	7	Horloĝa matematiko	35
PS – el Göteborgs-Posten, la naŭan de junio	7	Kuleto flugas	36
La tago de la PATRINO	8	Tri poemoj de Siv Burell el Penseo.....	36
La Nacia tago, 6 junio, estis celebrata sen publiko	8	Poemo de Hans-Georg Kaiser, Germanio	38
Pli da someraj hajkoj.....	9	Vortoj de l' tago.....	38
Orkestra vojaĝo al Hispanujo 2011	10	El Heroldo de Esperanto	39
La ripozloko de Sjöbergen, Gotenburgo	11	Nenio nova sub la suno.....	40
Mia vojaĝo al Hindio kaj Himalajo 1982	15	Merlo kantas al Magnus ĉe lago Stora Lövsjön	41
Vizito en Skänninge	18	”La malfruiĝinta najtingalo” venis kun saluto.....	42
La Sanktulino Brigito	20	Ĉu vi konas la esperantajn nomojn de kutimaj sovaĝaj floroj?	44
Cecilia Malmström, grandinflua sveda virino, politikistino por la liberala partio	21	Foje	44
Katja of Sweden.....	22	Pri diversaj profesioj	45
Anekdoto (el 1904).....	23	Pro kio oni bezonas advokaton?	46
Hilda Dresen (1896–1981) estona telegrafisto.....	24	Interlingvistikaj studoj en Poznań	46
Edith Södergran.....	25	Somera programo en Greziljono	47
Laboro por la esperanto-biblioteko en Stannum.....	28	Brazila retkurso.....	48
Sugesto pri legado.....	29	Agrablan someron deziras al vi la novtonditaj alpakoĵoj en Grayboo Ranch	48

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!



Bildo de Pixabay

Espeporko meditas... kaj pensas pri somermezo – eble ne estos kiel sur la bildo.



- ☆ **Carl-Erik Ohlsson**, Skövde, avled den 18 maj. Han blev nästan 92 år. Självs skulle han kanske ha sagt att han utkämpade den sista striden – *La lasta batalo*. Jag förknippar Carl-Erik med esperanto och med esperantoböcker. Från hans förlag Al-fab-et-o har vi i Göteborgs Esperantoförening fått överta ett antal böcker. En stor del av Sten Johanssons skrifter har Carl-Erik tryckt. På nästa sida kan du ”plocka böcker”. Varsågod! Bonvolu!
- ☆ I nästa La Espero har Gunnar Olsson, ordförande i Skövdeklubben, en detaljerad levnadsskildring av Carl-Erik. Det var Gunnar som fick Carl-Erik att bli intresserad av esperanto och som var kursledare för honom och många andra Skövdebor. Jag träffade Carl-Erik bara en eller möjligen två gånger, men vi hade en del telefonsamtal. Eftersom Carl-Erik hade väldigt mycket humor och gillade att leka med ord, gällde det att inte låta sig trolas bort, utan komma ihåg sitt ärende. Något allvarigare blev det förstås, när vi kom in på ämnet vaccination, som jag var för, men Carl-Erik starkt emot. Vi i Göteborgs Esperantoförening, som har träffat Carl-Erik, har många roliga minnen av honom. Han gjorde intryck. Birgitta Anevik skickade ett par bilder på Carl-Erik, då han var på datakurs i Skövdeklubbens esperantolokal 2012.

- ☆ Kio estas la simileco inter La sanktulino Brigito, Edit Södergran, Cecilia Malmström, Katja of Sweden kaj Hilda Dresen????? Respondo: Ili ja estas elstaraj en siaj diversaj fakoj pro memfido kaj la kuraĝo ili montris irante siajn proprajn vojojn. **DO, FORTAJ VIRINOJ!**
- ☆ Nuntempe oni ne rekomendas vojaĝojn. Sed en la memoro kaj fantazio oni vojaĝas... al Hispanio (Christin), al Hindio kaj Himalajo (Lasse) kaj al Skänninge (Ingegerd). Sed libertempo en Sjöbergen, Gotenburgo, vere estas proksima kaj ĝuinda. Bodil Jönsson skribas pri sia intereso pri parcela vivo – bone, precipe en korono-tempoj. **DO, VOJAĜU DIVERSLOKEN** – kun respekto por covid-19.
- ☆ Legu pri la interlingvistikaj studoj en Poznan far Bengt-Olof Åradsson kaj aliaj... kaj pri la studeblecojn en Greziljono kaj Brazilo! **DO, KOMUNIKADAJ STUDIOJ VALORAS!**
- ☆ Hans-Georg Kaiser gvidas retpaĝon en Facebook, kiu temas pri humuro. Carl-Erik certe ŝatus tiujn amuzaĵojn. Kaj vi? **DO, HUMURO LUMIGAS LA VIVON!**

Ĝis la aŭgusta numero! Agrablan someron!

/ Siv



Pluku librojn... kaj memoru la eldoniston Carl-Erik Ohlsson


Por memori pri la eldonisto Carl-Erik Ohlsson, kiu forpasis la 18an de majo en 2020, preskaŭ 92-jara, ni ofertas kelkajn librojn el lia iama eldonejo Al-fab-et-o. La malsupraj libroj estas senpagaj, sed la sendokoston vi povus sviŝi al nia kasisto Magnus Löndén 076-038 57 94, sed atendu ĝis vi havos la librojn. Mendu de mi, Siv Burell 070-721 34 79 / siv.burell@gmail.com.

En ĉi tiu numero de Ora Ĵurnalo vi povas mendi el nia stoko en Stannum: "Tio kunvenas" de Carl Jonas Almqvist, tradukita en esperanton de Sten Johansson. Estas romaneto pri vojaĝo kaj iom-post-ioma interkonatiĝo de Sara kaj Albert dum unu somera semajno.






Alia elekto povus esti: "La Orpantalono" de Max Lundgren, el facilega serio de Al-fab-et-o en 1996. Max Lundgren skribis la rakonton por junuloj, sed estas ja libro por ĉiuj aĝoj.

Knabo trovis malnovan pantalonon en provizo kaj el poŝo li povis eltiri monbiletojn – multegajn. Kune kun sia patro, li decidis doni la monon al bonfarado, sed la polico ekinteresiĝis pri la malavarajn donacojn, kaj... legu plu!



Se vi preferas krimromanetojn vi povus elekti iun de Sten Johansson, ekz:



Pri tiuj libretoj la verkisto Sten Johansson diras:

”Mi volis uzi la krimromanon formon por trakti aferojn, kiuj interesas min, ĉefe homajn karakterojn kaj interrilatojn kaj kelkajn fenomenojn de la nuntempa socio en kiu mi vivas. Krome mi volis uzi la realan geografion kie mi naskiĝis kaj kreskis en la sudorienta parto de la provinco Smolando, ĉe la Balta maro. Mi kreis du policistojn, la pli trankvila, iom rezignema Svedberg, kaj la pli vigla, ironia Jankéus, kaj en ĉiu el la romanetoj mi klopodis ke troviĝu almenaŭ du–tri personoj plurdimensiaj, kiuj espereble povus interesi la

legantojn. Kvankam la lokoj de krimo troviĝas en Svedio, mi volis enplekti ankaŭ internaciajn rilatojn, el ĉirkaŭ la Balta maro kaj pli fore. [...]

El lingva vidpunkto mi volis uzi la normalan, vivantan Esperanton hodiaŭan, tamen escepte aperas iu figuro kun aliaj lingvaj kutimoj. Se fari unu konkludon el la verkado de tiuj kvar romanetoj, mi dirus ke krimromanoj kutime pli facile legiĝas ol ”ordinaraj” romanoj, sed tio ne signifas ke ili pli facile verkiĝas.”

Bonan legadon! /Siv

Birgitta Anevik trovis bildon el 2012 pri komputila kurso en la klubejo de Skövde. De maldekstre sidas Henning (nepo de Birgitta), Carl-Erik kaj Solveig. Karl-Gustaf instruas. En la fono estas Bertil.

Birgitta fotis.



Manskribo aŭ maŝinskribo?

"Homoj kun malordema manskribo havas cerbojn, kiuj laboras pli rapide ol iliaj manoj".



Mi malofte skribas mane. Eĉ se mi skribas paperleterojn, mi uzas komputilon kaj printilon.

Amikino donis al mi belajn leterpaperojn kun floroj en angulo. Mi uzis ĝin sed trovis la jenan:

- 1) mi devis pripensi ĉiun vorton, ĉar "forpreno-butono" ne ekzistas
- 2) mi miksis skribstilon kun kaligrafstilo
- 3) mi bezonis pli da tempo
- 4) la rezulto ne estis tiel bela kiel la skribstilo de mia patrino
- 5) kelkaj literoj povus esti malfacile deĉifritaj
- 6) mia dekstra mano doloretis.

Kiam mi foje skribis leteron al mia filo je lia naskiĝtago sur bela leterpapero, mia nepo demandis: Kial avino ne nur telefonas???

Dum universitata prelego okazas, ke studento skribas memorfrazojn komputile, sed la plejparto uzas skribilojn kaj paperojn. Foje unu el miaj klasanoj demandis, ĉu mi uzas stenografion. Bedaŭrinde ne. Mia manskribo vere fariĝis malbona pro mia strebo noti tro multe. Hejme mi poste havis problemojn interpreti kiun mi skribis.

En Ora Ĵurnalo manskribo ne taŭgas — feliĉe por mi!

/Siv

Latinaj citaĵoj

Plenus venter non studet libenter.
Plena stomako ne volonte studas.

Qui dormit non peccat.
Kiu dormas ne pekas.

Verba volant, littera scripta manet.
Parolataj vortoj forflugas, la skribita restas.

In flagranti crimine comprehensi.
Kaptitaj ĉe freŝa faro.

Docti viri male pingunt.
Erudiciaj viroj manskribas malbone.

Non omne quod nitet aurum est.
Ne ĉio brilanta estas oro.

En Korona tempo

El la gazeto Göteborgs-Posten, 30 majo:

”Certe estas strange, ke vampiro en Ĉinio povis okazi mankon de klozetpapero en Gotenburgo”.

(*homoj hamstris*)

En **Kvinpinta Ludaro** de Eckhard Bick mi trovis la jenan ludon.

Sed nepre *ne* praktiku ĝin nun! Anstataŭ vampiro povus esti koronaviruso.



Tamen jen la ludo, ludota estontece (*mallongita kaj iomete ŝanĝita de mi*):

Ĉiuj sencele vagas kun fermitaj okuloj tra malhela ejo. Ĉiu de tempo al tempo faras mallaŭtajn pep-sonojn.


La ludestro iras al unu el la vagantoj kaj nomas lin vampiro. Tiu persono, venontfoje, kiam li hazarde iun tuŝas dum sia vagado, alkrias tiun kaj mordas lian kolon.

Do, nun estas du vampiroj kiuj volas vampirigi pliajn. Kiam renkontiĝas du ”normaluloj”

PS – el Göteborgs-Posten, la naŭan de junio

Estonta vizio

Kiam la pandemio estas je la fino, multaj okupos sin pri genepa zorgado, Gustaf!



nenio okazas. Sed kiam renkontiĝas du vampiroj, ili eble klopodas mordi unu la alian. Tiam ili neŭtraligas unu la alian kaj fariĝas normaluloj denove!

Post tempo oni lumigas la ejon kaj kalkulas la nombron da vampiroj kaj normaluloj. Povus esti ekvilibro.

Fine ĉiu manĝas ajlerojn!!

/Siv



La tago de la PATRINO

Diversaj landoj celebras la tagon de Patrino je diversaj datoj, la plej multaj dum la dua dimanĉo de majo, sed Svedio dum la lasta dimanĉo de majo.

La tradicio venis al Svedio de la usona "Mothers Day" en 1919.

La verkistino Cecilia Bååth-Holmberg eldonis "kajeron" kun la titolo "Mors dag". En la kajero estis instrukcio kiel celebri la tagon:

1. oni hisu la svedan flagon
2. la infanoj kantu al ŝi
3. antaŭ ol ŝi ellitiĝas la infanoj ofertu al ŝi kafon kaj panon. Ili ankaŭ honoru ŝin per floroj kaj etan donacon
4. la patrino ne faru mastruman laboron. La infanoj balau, faru la litojn, kuiru kaj lavu la telerojn
5. posttagmeze oni faru feston, kiam ankaŭ la patro kontribuu iel
6. infanoj, kiuj ne loĝas ĉe la familio, salutas sian patrinon per leteroj, telegramoj aŭ poŝtkartoj.

/Siv

La Nacia tago, 6 junio, estis celebrata sen publiko

La televido sendis dum 1 horo, 45 minutoj.

La kronprincina familio hisas la flagon. Pli poste Victoria gvidas nin en la reĝa palaco. Ŝi rakontas pri historiaj reĝoj kaj reĝinoj kaj pri la nuna uzado de la diversaj salonoj.



Ekster la reĝa palaco en Stokholmo ludas "Arméns Musikkår", la Orkestra Taĉmento de la Armeo.

La reĝa paro – Carl XVI Gustaf kaj Silvia – aŭskultas la grandiozan muzikon.

La ĉefministro Stefan Löfvén faris parolon, streĉante ke ni kunlaboru dum tiuj eksterordinaraj tempoj.




La ĥorkantado okazis digitale. De siaj propraj hejmoj kantistoj kantis svedajn popolajn kanzonojn.

Interese vidi la movantajjn buŝojn de la individuaj kantistoj! Vere mirinda tekniko!

Anne Lundberg gvidis la celebradon de la 6a de junio por la kvara fojo, nun kune kun Tara Moshizi. Ili ofertis interesan, varian programon kun artistoj el diversaj fakoj.

Se vi volus vidi la tutan programon – jen ĝi:



<https://www.svtplay.se/video/27031725/nationaldagen/nationaldagen-2020-6-juni-20-00>

/ Siv

Pli da someraj hajkoj

Senhalte

kantas la cikado

kies vivo estas tiel mallonga

Bashō

La sono de tondilo

tondante rozojn

en la somerpluvo

Shiki

Momente silentiĝis

inter la alvenoj de la gastoj –

tiam oni ekvidis la peoniojn

Buson

Orkestra vojaĝo al Hispanujo 2011

Kiam estas vintro kaj malvarma vetero, povas esti agrable pensi pri ĝoja somermemoro. En la somero 2011 mi kaj mia orkestro, kiu nomiĝas KUB, Kungälvs Unga Blåsare (Junaj Blovistoj en Kungälv) iris al Hispanujo. Ni estis pli ol 40 muzikistoj kaj kelkaj orkestraj direktoroj. Estis tre ĝoje tie.

Ni loĝis en la urbeto Calella en hotelo kiu nomiĝas Mar Blau.



Ni koncertis sur la strando preskaŭ ĉiujn vesperojn.

La melodioj, kiujn ni ludis, estis inter aliaj: "Can you feel the love tonight", "Can't help falling in love", "Under blâgul fana (Sub bluflava standardo)" kaj multaj aliaj melodioj.

Iun tagon ĉiuj en la orkestro vojaĝis per aŭtobuso kun gvidanto tra Barcelono. Ni vizitis la grandan katedralon "Sagrada Familia".

Ĉio estis tiel ĝoja ke mi dum promeno en la varma vetero al la piedpilkstadiono "Camp Nou" forgesis trinki akvon. Mi eknaŭziĝis kaj devis resti iomete en la hotelĉambro kiam ni revenis.

La vojaĝaj gvidantoj kiuj ankaŭ estis niaj instruistoj en la kultura lernejo maltrankviliĝis pri mi, ĉu mi povus partopreni dum la vespero aŭ ne, sed mi eksaniĝis post momento, tiel ke mi povis partopreni.

Estis multe da muziko tie, alvenis multaj orkestroj el aliaj lokoj.



Sed somera semajno en Hispanujo pasas rapide kaj baldaŭ ni devis flugi hejmen!

Christin Granat

La ripozloko de Sjöbergen, Gotenburgo

Bodil Jönsson rakontas



La parcela ĝardeno de Sjöbergen situas ĉe la suda pontoreduto de Älvsborgsbron.

Estas vera oazo por gotenburganoj, aparte en la korona tempo.



Sjöbergen – en grön oas där geten skuttar

Naturområdet Sjöbergen, som är beläget i närheten av Älvsborgsbrons södra fäste, är ett populärt utflyktsmål för många göteborgare och andra besökare. Där finns naturstigar, utsiktsplatser, smådjursuppfödning och odlingsområden som är öppna för allmänheten året om.

Under den tidiga våren ligger marken mörk och karg och luften fylls av lukten från getter och delvis nedmyllad hönskötsel, men ur den bruna jorden växer snart en frodig grönska och dofterna av syrener, liljekonvaljer och doftpioner börjar spridas. Från träden hörs bofinkar, lövsångare och rödhakar.

Ibland sjunger koltrasten och svarthättan samtidigt, bedårande vackert, nästan som en duett med Barbara Hendricks och Aksel Rykkvin, om de skulle sjunga tillsammans.

Jag fick en odlingslott i detta lilla paradiset.

I flera år försökte jag förgäves få en köplats till en lott i Sjöbergen. Kön stängdes 2013, då köplatsantalet uppgick till 170.

Varje gång jag besökte odlarföreningens hemsida, läste jag: Kön är stängd.

Jag strövade ofta omkring i området och började bekanta mig med flera av odlarna. En dag ryktades det att man snart skulle öppna kön.

Morgon, middag, kväll kontrollerade jag hemsidan. Så en dag: KÖN ÖPPNAR IGEN. Jag skickade in en ansökan med blixtns hastighet och fick positivt svar.

Dagen efter läste jag: Nu är kön uppe i 50 personer och vi stänger kön igen. Puh! Jag hade säkrat en köplats. Nr 46. I bästa fall skulle jag hinna få en odlingslott under min livstid! Mindre än ett år senare – när vintern var i antågande – fick jag veta att det fanns lediga odlingslotter. Intresset för att börja gräva och planera odling i kylan och höstmörkret var ganska svalt bland de köande, som inte hade fått någon lott under

Sjöbergen – verda oazo, kie saltas la kapro

La natura areo Sjöbergen (Lagomontoj), kiu situas en la proksimeco de la suda abutmento de Älvsborgsbron, estas populara ekskurscelo por multaj gotenburganoj kaj aliaj vizitantoj. Tie troviĝas naturpadoj, belvidejoj, bredado de etbestoj kaj kultivadaj lokoj, kiuj estas malfermitaj por la publiko dum la tuta jaro.

Dum la frua printempo, la tero kuŝas malhela kaj senfrukta kaj la aero pleniĝas de laodoro de kaproj kaj parte enterigita kokinsteko, sed el la bruna tero baldaŭ kreskos abunda verdaĵo, kaj la bonodoro de siringoj, konvaloj kaj odorpeonioj komencas disvastiĝi. De la arboj oni aŭdas fringojn, filoskopojn kaj ruĝgorĝulojn.

Foje la merlo kaj la nigraĉapa silvio kantas samtempe, rave bele, preskaŭ kiel dueto kun Barbara Hendricks kaj Aksel Rykkvin, se ili kantus kune.

Mi ricevis kultivadejon en ĉi tiu eta paradizo.

Dum kelkaj jaroj mi vane provis ricevi atendvicon por kultivadejo en Sjöbergen. La vico estis fermita en 2013, kiam la vicnombro atingis 170.

Ĉiun fojon kiam mi vizitis la retpaĝon de la kultivada asocio, mi legis: La atendvico estas fermita.

Mi ofte vagadis en la areo kaj komencis konatiĝi kun kelkaj el la kultivistoj. Iun tagon kuris la famo ke oni baldaŭ malfermos la vicon.

Matene, tagmeze, vespere mi kontrolis la retpaĝon. Do, iun tagon: LA ATENDVICO MALFERMIĜOS DENOVE. Mi sendis petskribon fulmrapide kaj ricevis pozitivan respondon.

La sekvan tagon mi legis: Nun la vico atingis la nombron de 50 personoj kaj ni fermas la vicon denove. Uf! Mi estis garantiita viclokon. Numero 46. En plej bona okazo mi povus ricevi kultivpecon dum mia vivotempo. Malpli ol unu jaron poste – kiam vintro estis survoje – mi eksciis ke troviĝas neokupitaj kulturejoj. La intereso pri fosado kaj planado por kultivo en

sommaren. Jag hade därför hamnat först i kön och fick välja var jag helst ville odla. Äntligen hade jag fått ett litet lantställe med bara några minuters färdväg från bostaden. Marken var igenvuxen med kvickrot och kirskaål, vars rötter satt som armeringsjärn i den hårda jorden, men det gjorde ingenting. Jag skulle ha sol hela eftermiddagen och en bit in på kvällen under sommarhalvåret och jag njöt av att bara vara där.

Jag grävde och rensade. Anlade en perennrabatt. Fortsatte att gräva och rensa tills vintern kom och ryggen klagade.

Nästa år kunde jag skörda zucchini, mangold, isbergssallad och blomsterbönor. Perennrabatten stod i full blom och krasse och ringblommor flammade som små eldhav bland grödorna.

Lite historia

Sjöbergen har under årens lopp bytt skepnad. Under finska kriget 1808–1809 blev unga män inkallade till lantvärnet. Många av dem dog i dysenteri och begravdes i Sjöbergen. Soldatkyrkogården upptäcktes i samband med Älvsborgsbrons tillkomst.

Under första delen av 1900-talet bodde Nattmannen här. Nattmannen hade till uppgift att samla in och gräva ned stadens döda djur och avliva herrelösa hundar. Därför kallades den delen av området för Nattmansskogen, eller Nappna, som barnen döpte om den till.

Det fanns smådjurshållning redan på 1930-talet. Det har funnits växthus och små stugor byggda av sockerlådor. En tid fanns det även ett sanatorium. När det inte längre var i bruk och började förfalla förvandlades det till lekplats av barnen från barnrikehusen i Sanna.

I och med byggandet av Älvsborgsbron försvann de sista resterna av den äldre bebyggelsen.

Det fanns odlingar i Sjöbergen redan på 1950-talet, men det var inte förrän under senare

la malvarmeco kaj aŭtuna malhelo estis sufiĉe malforta ĉe la vicatenduloj, kiuj ne ricevis iun kulturejon dum la somero. Tial mi iĝis la unua en la vico kaj povis elekti kie mi plej volonte volis kultivi. Finfine, mi estis ricevinta kampareton en vojdistanco de nur kelkaj minutoj de mia loĝejo. La tero estis kovriĝinta per kreskaĵoj kiel kvikoj kaj egopodio, kies radikoj fiksiĝis kiel armferoj en la malmola tero, sed ne gravis. Somere mi havos sunbrilon la tutan posttagmezon kaj parte de la vespero dum la somera duonjaro kaj mi ĝuis nur esti tie.

Mi fosis kaj elsarkis. Plantis perenan florbedon. Daŭrigis la fosadon kaj la elsarkon ĝis venis la vintro kaj la dorso plendis.

La sekvan jaron mi povis rikolti kukurbetojn, folibetojn, frostan laktukon kaj florfabojn. La perena bedo estis plene floranta kaj tropeoloj kaj kalenduloj flamis kiel eta oceano da fajro inter la kreskaĵoj.

lom da historio

Sjöbergen dum la jaroj ŝanĝis aspekton. Dum la finna milito 1808–1809 junaj viroj estis konskripcitaj al la milicio. Multaj el ili mortis pro disenterio kaj estis enterigitaj en Sjöbergen. La soldata tombejo estis trovita lige al la estiĝo de ponto Älvsborgsbron.

Dum la unua parto de la 20a jarcento la "Nokta Viro" loĝis ĉi tie. Lia tasko estis kolekti kaj enterigi la mortintajn bestojn de la urbo kaj senvivigi senmastrajn hundojn. Tial tiu parto de la areo estis nomata "la Arbaro de la Nokta Viro" aŭ "Nappna", kiel nomis ĝin la infanoj.

Estis bredado de etbestoj jam en la 30aj jaroj. Troviĝis plantodomoj kaj etaj kabanoj, konstruitaj el sukerokestoj. Tempe ankaŭ troviĝis sanatorio. Kiam ĝi ne plu estis uzata kaj komencis kadukiĝi la ejo transformiĝis en ludejon de la infanoj de la multinfanaj domoj en Sanna.

Lige al la konstruado de Älvsborgsbron la lastaj restaĵoj de la pli malnova loĝejaro malaperis.

Troviĝis kultivado en Sjöbergen jam en la 50a jardeko, sed estis nur en la pli malfrua parto

delen av 1970-talet som arrendekontrakt med Göteborgs stad kom till.

Sedan 1980-talet finns det krav på föreningstillhörighet för att bruka jord eller hålla djur i Sjöbergen. Sjöbergens Norra och Sjöbergens Södra odlarförening, Sjöbergens djurförening, Sanna brevduveklubb och Västra Frölunda Biodlareförening arrenderar för närvarande mark av Göteborgs stad.

Sjöbergens dag

Under senare år har Sjöbergens brukarföreningar varje höst bjudit in allmänheten till "Sjöbergens dag" med musik, tipspromenad för vuxna och barn, lotterier, fika, grönsakssoppa, försäljning av honung och andra produkter, samt tävling i tuppgalning och kaninhoppning – när djuren så önskat.

Kampen för att bevara Sjöbergen

Sjöbergens attraktiva läge med utsikt över hamninloppet har länge varit intressant för exploatering.

Planer på en storskalig nybyggnation av bostäder har hängt som ett hot över Sjöbergens arrendatorer i många år, vilket gett upphov till protester både från brukare och allmänhet. Under de senaste tio åren har Göteborgs stad fått ta emot mer än 8.000 namnunderskrifter med krav på att bevara Sjöbergen som ett djur-, natur- och kulturområde. Göteborgsförslaget "Skydda Sjöbergen" lämnades in i augusti 2018 och i mars 2020 beslutade Byggnadsnämnden att skogspartiet, odlingsområdet och området på höjden nära älven inte ska exploateras.

En seger för hundratals brukare, tiotusentals göteborgare och därtill miljontals honungsbin, kaniner, riddarsporrar, tuppar, getter, koltrastar, rosenbönor, brevduvor, doftpioner, svarthättor, grodor, purjolökar, rödhakar, höns, bofinkar, gröngölingar, blåmesar, talgoxar och en och annan blyg viol, som inte haft möjlighet att underteckna uppopen, men som fortsättningsvis kan ha

de la 70aj jaroj ke farmokontrakto kun la gotenburga urbo ekis.

Ekde la 80aj jaroj estas postulo aparteni al societo por rajti kultivadi teron aŭ bredi bestojn en Sjöbergen. La norda kaj la suda kultivadasocioj de Sjöbergen, la bestsocieto de Sjöbergen, la leterkolomba klubo de Sanna, kaj la abelbredada asocio de Västra Frölunda nun farmas teron de la urbo Gotenburgo.

La tago de Sjöbergen

Dum la pli lastaj jaroj la kultivada asocio de Sjöbergen ĉiun aŭtunon invitas la publikon al la "Tago de Sjöbergen" kun muziko, poenta promeno por plenkreskuloj kaj infanoj, loterioj, kafumo, legoma supo, vendado de mielo kaj aliaj produktoj kaj konkurso pri kokeriki kaj kuniklosaltado – se la bestoj volas.

La batalo por savi Sjöbergen

La alloga loko de Sjöbergen kun panoramo al la enirejo de la haveno, longtempe estis interesa por ekspluatado.

Planoj pri grandskala novkonstruado de loĝejoj pendas kiel minaco al la farmuloj dum multaj jaroj, kio okazigis protestojn de uzantoj kaj publiko. Dum la plej lastaj dek jaroj la urbo Gotenburgo ricevis pli ol 8 000 subskribojn kun postulo gardi Sjöbergen kiel best-, natur- kaj kulturareo. La gotenburga propono "Gardi Sjöbergen" estis transdonita en aŭgusto 2018, kaj en marto 2020 la Konstruokomisiono decidis ke la arbarejo, kultivadejo kaj la areo sur la altaĵo proksime al la rivero ne estu ekspluatata.

Venko por centoj da uzantoj, dekmiloj da gotenburganoj kaj krome milionoj da mielabeloj, kunikloj, delfinioj, virkokoĵoj, kaproj, merloj, rozfaboj, leterkolomboj, bonodoraj peonioj, nigraĉapaj silvioj, ranoj, poreoj, ruĝgorĝuloj, kokinoj, fringoj, verdaj pegoj, bluaj peruoj, grandaj paruoj kaj kelkiuj timidaj violoj, kiuj ne havis eblecon subskribi la apelacion, sed kiuj daŭre povos havi sekuran rifuĝejon en Sjöbergen ĝojigante vizitantojn per sia nura estanteco.

en tryggad fristad i Sjöbergen och glädja besökare med sin blotta närvaro.

Alla hälsas varmt välkomna till Sjöbergen!

/ Bodil

Ĉiuj estu varme bonvenaj al Sjöbergen!

/ Bodil

Mia vojaĝo al Hindio kaj Himalajo 1982

de Lasse Granat

Mi kaj kelkaj geamikoj intencis vojaĝi al Hindio kaj Himalajo, la aliaj ĉefe pro kulturaj studoj, tamen mi interesiĝis multe pri alpaj medioj. Kiam la foriro alproksimiĝis, la aliaj ricevis novajn gravajn labortaskojn, tiel ke ili ne povis fari tian longan vojaĝon, sed miaj planoj estis tiel ampleksaj ke mi iris sola. Iom pli ol unu monaton da ferio kaj preskaŭ du monatojn da forpermeso de Ericsson. Mi proponis ke mi povos viziti tiujn Ericssonajn oficejojn kiujn mi preterpasos.

La plej malmultekosta vojaĝmaniero estis flugi per Aeroflot, la malavantaĝo estis nur ke ĉiuj linioj devis iri tra Moskvo kaj plue de tie post tagnokto aŭ simile. Aeroflot estis donacema kaj ĉirkaŭportis kokidon, rizon kaj ruĝvinon, tiom multe kiom oni deziris, ĉiun duan horon en la aero. Samarkando, Taŝkento kaj Karaĉo estis tre streĉaj lokoj por vizitoj, speciale ĉar oni ĉirkaŭiĝis per mitraletarmitaj soldatoj la tutan tempon.

Finfine ni surteriĝis sur Dumdum Airport ekster Kolkato. De la tiama malgastama Moskvo al varmo kaj humaneco kiu frapis kiel brakumego en la menso. Mi sentis min kvazaŭ hejme en miaj infanecaj vilaĝoj kun bruludantaj infanoj, blekantaj bovinoj kaj vokantaj patrinoj. Afabla taksioŝoforo veturigis min al bona kaj malmultekosta hotelo meze de la urbokerno. Preskaŭ ĉiuj ĉambroj estis okupitaj krom ĉambro sur la tegmentoteraso, kiun mi dividis kun du inĝenieroj de Bombay. Kiam mi staris sur la teraso kaj rigardis la svarmantan, vivoplenan homamason sube, mi sentis min hejme. Tiam korniko subteriĝis

sur mia verto, restis kelkajn sekundojn, mi ne havis tempon por reagi, kaj ĝi poste forflugis. Mi tute ne timigis ĝin, sentiĝis kiel saluto: "Bonvenon ĉi tien, Lasse!"



Estas malvaste en aŭtobusoj kaj tramoj, ĉi tie mi preterpasas Ericssonan oficejon, sed mi ne havis sufiĉe da tempo por vizitado.

Mi volis diskuti kun la rikiŝaj ŝoforoj pri laborkondiĉoj, sed unu el ili diris: "Vi gajnas viajn monojn per laboro en Svedio, ĉi tio



estas la sola maniero por mi gajni ion, do, bonvolu veturi kun mi! Kien vi volas?"



La loĝejonivelejoj estas diversaj, iuj estas nebonaj, aliaj estas pli luksaj, kiel la "Victoria Memorial".




Estas grandegaj kvantoj de modernaj transportrimedoj, sed kelkfoje aperas kaleŝoj kiuj ŝajnas esti postlasitaj dum kelkaj miloj da jaroj: ekzemple bovĉaroj ŝarĝitaj kun sakoj.



En Katmanduo troviĝas multe da Budho-temploj. Fine de mia teksto bildo de la "kuŝanta Budho", ofte kovrita per floroj kun fortaj koloroj.



La vendotablo por legomoj estas solida kaj efika.




Kiam oni volas teksti ion, oni unue devas varpi la teksotaĵon, tio estas ordigi ĉiujn laŭlongajn fadenojn. La vorto "varpi" venas el la ĝermana vorto "werfen" kiu signifas ke oni ĵetas ion. Je la sekva bildo oni vidas kiel la virinoj ĵetas fadenbulon de blua ŝpinfadenoj tien kaj reen kaj finfine ricevas pretan varpon.



La varpo oni poste povas munti en teksileto kun eta buklo ĉirkaŭ ĉiu varpfadeno kiel oni per manmovo povas levi tiujn varpfadenojn kiujn oni deziras por krei certan modelon. Oni ankaŭ povas, kiel en la bildo, enplekti la transversajn fadenojn tute mane.



Kiel piediranta turisto oni kelkfoje devas lavi vestojn. Se oni luas remboaton en sunbrila tago, oni ricevas kaj lavon kaj sekigon senkoste.



Kavigita kverktrunko ankaŭ donis bonan pagajekskurson kun la somerpalaco de la reĝo en la vido, sed mi preterpagajis, ankaŭ ili certe volas havi kvietecon kaj trankvilecon.

Sur la trajno al Darjeeling oni preterpasas grandegajn tekulturejojn.




La altdiferencoj estas grandaj, la lokomotivo devas halti kelkfoje por havi akvon.




Je kruta rokkresto la trajnreloj estis muntita kiel "lopo" por povi plialtiĝi sin multe je tre mallonga distanco.



Speciala aperaĵo estas la preĝocilindroj, sur ĉiu cilindro estas unu preĝo skribita. Oni ekrotaciigis la cilindron mane. Kiel la tasko poste funkcias ne estas prijuĝebla de mi.



Ĉiuj vojaĝoj havas finon. Ankaŭ survoje hejmen oni pasis tra Moskvo.



La kuŝanta Budho.

Vizito en Skänninge

de Ingegerd Granat

Finfine mi estis ree en Skänninge, la loko kiu havas tiom da demandoj kaj tiom da malmultaj respondoj. Memoroj de malaperintaj tagoj troviĝas ĉie.

Sur la placo staras Ture Lång somertempe kaj priatentas la forton kaj farton de la gastoj en la malnova urba hotelo. Ne malproksime de tiu loko staras Vårfrukyrkan. La preĝejo estis konstruita en 1301 kaj ĝi estas enorma koloso en gotika stilo, kiu estas videbla je distanco de mejloj.

La preĝejo Vårfrukyrkan


En la 16a jarcento Skänninge fariĝis viktimo de la despotaj ruinigoj far la reĝo Gustavo Vasa. La urbaj privilegioj estis retiritaj kaj plue potencaj loĝantoj estis ordonataj translokiĝi de tie. Tion ili verŝajne faris. Gustas Vasa ja pensis ke Vadstena estu la granda metropolo.



Ture Lång, simbolo de Skänninge (el Wikipedia).

Li efektive malkonstruigis grandajn partojn de Skänninge, kiu havis multe da uzebla materialo per kiu li povis konstrui Vadstena.

Ankaŭ la monaĥinoj de Skänninge estis de la granda patro de la popolo ordonataj translokiĝi al Vadstena. Ili tamen havis alian patron al kiu ili pli aŭskultis kaj ili restis fidemaj al Skänninge ĝis la monaĥejo forbruliĝis.



La preĝejo Vårfrukyrkan.

La grandaj kermesoj, kiuj donis al Skänninge grandajn enspezojn, estis malpermesitaj de la reĝo Gustavo. Devas esti Vadstena kiu fariĝu la plej grava loko en la regiono. Infanoj ofte estas pli bonaj ol siaj gepatroj kaj same ankaŭ koncerne la infanojn de la reĝo Gustavo – de la popolo nomita Gösta. Kiam Johan la III:a ricevis la regnadon, estis redonitaj al Skänninge la urbaj privilegioj kaj la enspezriĉaj kermesoj denove estis permesataj.

Specialaĵo de la kermesoj eble estas la festo de Valpurga Antaŭvespero. Ĉi tie troviĝas ekstravaganca piroteknikaĵo, printempaj kantoj de ĥoro, parolo de la politikistoj de la komunumo, fajrojonglistoj, kolbaskiosko kaj amaso da homoj, celebrantaj Valpurgon. Ĉu Gustav Vasa povus aranĝi ion pli eksplodan?

Mi dubas. Dank' al agado de "Lions" la ĉielo estas lumigita ĉiun printempon en Skänninge.

La urbo havas multe pli por rakonti ekde la 10a jarcento ĝis la nuna tempo. Kelkaj lokoj, kiuj indas viziton eble estas iu el la kvar muzeoj:

La urba muzeo, kiu troviĝas en la urbodomo.

Axbomsgården montras mediojn de la lernejo en la 19a jarcento.

Sjölinggården, vendejo kun apoteka muzeo kaj variaj kuirejaj medioj. Tie oni ankaŭ povas viziti la plej malnovan muzeokonstruaĵon, **Solbergstugan**.

Sandbergsgården montras originalan burĝan medion de la 19a jarcento.

En tiuj muzeoj aŭ en la proksimeco oni ofte povas trovi pretigitajn kafotablojn kun hejmbakitaĵoj. Estante en Skänninge, oni ne maltrafu la malnovan spicoĝardenon, kiu troviĝas en "Malnova Skänninge". Ĝi donas inspiron kaj mildiĝon al la animo.

Eble oni en la vento povus aŭskulti la preĝojn de la monaĥinoj kaj de la monaĥineja muro proksime.

I Bjälbo oni tronas sur memoroj de "iamaj antikvaj grandtagoj". La preĝejon, kiu servis kaj al la religio kaj al bataloj, oni komencis konstrui jam dum la unua duono de la 13a jarcento.

La spektakla turo estis aldonita verŝajne en 1220. Okcidente de la preĝejo situas la tombo de la Bjälbo-familio, kaj la preĝejon ili rigardis kiel sian propran bienopreĝejon.

Oni diras ke Birger Brosa, la onklo de la fama Birger Jarl, respondecis pri la konstruadoj kaj de la turo kaj de la preĝejo.

Oni bezonus koni pli post la resumo en Skänninge kun ĉirkaŭaĵo. Konvene sidiĝu en via plej bona komforta fotelo kaj spektu la

filmon pri la la sorto kaj aventuroj de Arn, laŭ la fama libroserio de Jan Guillou.


Tiel finiĝis la vizito al Skänninge tiun fojon.

/ Ingegerd



La placo en Skänninge (Wikipedia).

La Sanktulino Brigito



Ĉu vi volas iri kun mi sur la ĉiela vojo de la sveda sanktulino Brigito (svede Birgitta)?

Tiaokaze la unua paŝo estas en la bieno "Finsta" en "Upplando", kie ŝi naskiĝis en la jaro 1303.

Ŝia patro estis legisto Birger Persson en "Upplando", kaj li estis la plej potenca viro en

la provinco. La patro Birger ankaŭ gvidis la skribadon de "la leĝo de Uplando".

Pri la infana periodo neniu havis multe da informo, sed la pastro en la paroĥo havis revelacion, kiu montris virgulinon sidante kaj legante libron.

La pastro aŭdis: Al Birger filino naskiĝos kies mirinda voĉo oni aŭdos en la tuta mondo. Kaj

Brigito estis naskita, kaj dum la juna tempo ŝi vidis kaj aŭdis ĉion, kion neniu alia povus vidi aŭ aŭdi. La knabino havis vojon al Dio.

Kiam ŝi havis dektri jarojn ŝi edziniĝis al Ulf Gudmarsson, la filo de la leĝisto Gudmar Magnusson. La juna paro faris sian hejmon ĉe la lago Boren kie la bieno Ulvåsa situis.

Iom post iom Birgitta kaj Ulf havis ok infanojn kaj la familia vivo daŭriĝis. Ulf estis gaja viro kiu ŝatis festojn kaj ĝojbruojn. La edzino Brigito ne havis saman inklinon.

Dum la sveda periodo Brigito havis kontakton kun la tiama reĝo Magnus Eriksson. Ŝi estis ankaŭ instruistino de la reĝino Blanka de Namur.

En la jaro 1340 Birgitta kaj Ulf vojaĝis kiel pilgrimantoj al Norvegio, pli ekzakte Nidaros. La restaĵo de la sanktulo "Olav la Sankta" troviĝis tie.

Dum la jaro 1341 ili vojaĝis al "Santiago de Compostela" en la nordokcidenta Hispanujo. La edzo Ulf malsaniĝis survoje hejmen, sed Brigito havis viziojn ke Ulf resaniĝos kaj ke Dio volas paroli kun la mondo tra ŝi.

La edzo mortis en la jaro 1344 kaj estis entombigita en Alvastra en la monaĥa preĝejo tie. Post la morto de Ulf Gudmarsson Brigito dediĉis sin al Dio.

Ni ĉiuj konas ke Brigito havis sian preĝejon laŭ ŝia volo en "Vadstena", kaj tie troviĝas relikvujo, kiu enhavas restaĵojn de la kanonizita sanktulino Brigito kaj ŝia filino Katarina sed ne nur ili! Povas esti restaĵoj de "Ingrid de Skänninge", "Hemming de Åbo", "Sigfrid de Växjö" kaj "Knut la Sankta de Danio", kaj pluraj aliaj. Multaj streĉaj okazoj okazis kun la restaĵoj de Brigito kaj ŝia filino sed tio estas alia historio.



Cecilia Malmström, grandinflua sveda virino, politikistino por la liberala partio

Cecilia naskiĝis en 1968 en Stokholmo. Edukado: la gimnazio de Schillerska, la universitatoj de Gotenburgo kaj Parizo. Profesio: politika sciencisto.

En 1990–2006 ŝi estis membro de la Eŭropa parlamento.

2006–2010 ŝi estis EU-ministro; 2010–2019 la EU-komisiisto de Svedio, respondeca pri komercaj aferoj.

Edzo: Mikael Jansson, du infanoj (ĝemeloj). En 2019 oni nomumis ŝin "la svedino de la mondo".

Ŝia manskribo: *Cecilia Malmström*

Cecilia regas multajn lingvojn kaj mi estas certa ke ŝi povas kompreni ĉi tiun tekston sen traduko. Ŝi flue parolas la anglan, la hispanan,



la francan kaj kompreneble la svedan, kaj eble komprenas pliajn. Wikipedio ne skribis

”la germanan” sed ankaŭ ŝi devus regi tiun lingvon, ĉar ŝi tempe laboris en Stuttgart.

Kiam Esperanto-Societo de Gotenburgo havis propran klubejon en Masthuggsliden 1, Cecilia foje vizitis nin. I.a. ŝi parolis pri lingvoj: En EU ĉio ne estas traktata en plenkunsida salono kun interpretistoj, sed ankaŭ en koridoroj, kafejoj kaj en etaj grupoj oni ja diskutas gravajn aferojn. Troviĝis parlamentarano, kiu nur konis sian gepatran lingvon kaj ne povis partopreni en kunvenoj sen interpretisto. Li ja estis elektita pro siaj politikaj meritoj – ne pro lia lingvokono. Malbone por la demokratio!

Kion ŝi diris pri esperanto? Ŝi certe dubis pri la sukceso de nia lingvo, sed ŝi konsilis al ni esti pli videblaj, pli aktivaj, pli kuraĝaj!

Kion ŝi nun pensas pri esperanto? Ŝi translokiĝis reen al Gotenburgo. Mi

poŝtletere demandis ŝin pri ŝia nuna sinteno kaj pri ŝia nuna komisio.

Ŝi respondis, ke ŝi bone memoras sian viziton al la gotenburga klubo. Bedaŭrinde ŝi nun ne havas tempon skribi ion por Ora Ĵurnalo. Ŝi ja estas tro okupita. Jes kompreneble. Tamen mi ĝojas ke ŝi denove loĝas en Gotenburgo.

En la revuo ”NU” mi legas ke ŝi vere bedaŭras ke ”Svedio riskas esti izolata, se la lando insistas esti la plej ŝparema EU-lando”. Temas pri la diskuto kiel ekonomie helpi malriĉajn EU-landojn post la covid-19-krizo. La nuna sveda sinteno estas ke oni nur donu monpruntojn, ne rektajn donacojn. Kune kun Danio, Aŭstrio kaj Nederlando Svedio kontraŭas donacojn.

Mi ankaŭ cerbumas – kial Svedio ne helpis Italion dum la pinto de la covid-19-krizo?

/ Siv

Katja of Sweden

– Göteborgs-Posten havas artikolon (5 junio) pri ekspozicio en la Röhsska muzeo



Katja Geiger inter du el siaj manekenoj.

Temas pri vestaĵoj, ŝuoj kaj endoma dekorarto. Ĝi estas vizitebla ĝis la 20a de septembro.

Katja Ingegerd Hallberg naskiĝis en 1920 kaj mortis en 2017. Ŝi fariĝis fama kiel modkreisto sub la nomo Katja of Sweden.

Kiam aliaj junaj estontaj modkreistoj iris al Parizo, ŝi iris al ”Parsons – The New School for Design” en Novjorko. Tie ŝi renkontis la filmproduktiston Rod Geiger, kiu fariĝis ŝia edzo.

Antaŭ ol Katja finfaris sian edukon ŝi iris al la fama grandmagazeno Lord & Tayler kun sia sortimento en eta blanka valizo: kvin bluzoj, kvar pantalonoj kaj kvin jupoj. La ĉefaĉetisto ŝatis la vestaĵojn kaj ŝi ricevis kontrakton – kaj ”Katja of Sweden” estis naskita!

Lige al ekspozicio en Parizo en 1966, la gazetaro skribis tre favore pri ŝi. Gazetfotografistoj luis biciklojn kaj la manekenoj, vestitaj per vestaĵoj kreitaj de Katja, estis fotitaj sur bicikloj antaŭ la Eiffelturo.


Katja reprezentis novkreecon kaj novpensadon pri kvalito, koloro, formo kaj tajlorplano. Ŝi liberigis la virinojn de korsetoj per siaj klasikaj simplaj vestaĵoj, ofte de ĵerzo, kiujn oni facile povas lavi, sekigi kaj surmeti. Komfortaj ŝuoj sen altaj kalkanoj estas regulo. Anstataŭ juveloj, la dekoracio estis en la ŝtofo. Ŝiaj trikitaj ĵerzoj ankaŭ estis popularaj.

Rod konis italon en Novjorko, kiu posedis teksan uzinon en Novjorko, kaj la produktado komenciĝis. En 1948 Katja of Sweden estis fakto kaj ŝi havis veran sukceson.

En la 50a jardeko Katja kaj Rod forlasis Usonon. Rod estis bojkotita de la "filmmondo" ĉar kolegoj de li diris ke li estas simpatianto de la komunista partio. Je tiu tempo usonanoj timegis komunistojn. La paro translokiĝis al Romo.

En Romo loĝis la malnova amiko de Rod, Roberto Rossellini, kaj lia edzino Ingrid Bergman fariĝis kliento de Katja. Aliaj famaj klientoj sekvis kaj denove Katja havis prosperon.

Sed denove la paro translokiĝis, denove al Usono, kie ili restis dum 23 jaroj. Tie Katja ne nur dezajnis vestaĵon, sed ankaŭ endoman



Vanity Fair-kovrilo de 1962.
Foto: Viveca Ohlsson/Kulturen

dekorajn – litotukojn, lankovrilojn, banĉambrajn matojn k.t.p.

Tamen Svedio logis ilin kaj ili fariĝis svedoj.

En la jaro 2000 Rod forpasis. Katja vendis ilian domon kaj translokiĝis al Tollarp, Skanio.

Se Katja vivus dum tri pluaj jaroj, ŝi estus 100-jara, sed ŝi mortis en 2017. Tamen ŝia famo restas.

Malmö havis ekspozicion de "Katja of Sweden" ĝis la 23a de februaro 2020 kaj nun estas Gotenburgo en vico – ĝis septembro. Estu bonvenaj!

/ Siv

Anekdotoj (el 1904)


KONATAJ SIMPTOMOJ – "La vivo estas eraro", la incitiĝema pasaĝero diris lace. "La viro estas trompulo, la virino ansero, la feliĉo ĥimero, la amikeco blago. La amo estas malsano, la beleco iluzio, la geedziĝo stultaĵo, la edzino ksantipo, infanoj abomenaĵo. La bono estas nur hipokritado, la malbono estas

la bono senvualigita. Mono estas ĉio. Sed cetere, kio estas ĉio? Nenio!"

"Agrable ekkoni vin", diris gaje la alia pasaĝero. "Mi ankaŭ iam havis ventrokataron, mi do scias, kiel ĝi sentiĝas."

Inaj poetoj ne troviĝis en la maja numero de Ora Ĵurnalo, sed jen **Hilda Dresen (1896–1981) estona telegrafisto**

En 1913 ŝi eklernis Esperanton kaj ekde 1922 ŝiaj tradukoj aperas en diversaj gazetoj. Originale ŝi ekverkis en 1927, sed okupis ĉefe pri tradukado.



Averto

Ironion metu for,
gardu vin de piko moka;
kredu: ties pinto hoka
ŝiros vundon en la kor'.

Same plenas de defend'
ankaŭ falsa vorto flata,
kaj min faros senkompata,
poste vin ne helpas plend'.

Konfeso

Min al via brusto mi apogi volus,
ja animoj niaj certe ekparolus,
koroj niaj tremus de feliĉ' subita
plenumiĝus revo dorlotita.

Mi tre klare sentas via kor' matura
kiun tiom hardis la sufer' tortura,
firme mian koron povus al si ĉeni:
nur al vi mi povus fide aparteni.



Omaĝe al du hungaraj esperantistoj:

← Julio Baghy (1891–1967)
Kalman Kolocsay (1891–1976) →



Julio Baghy

Preter vivo tro racia
vigle migras plum' de nia
kara vagabond',
kaj aŭskultas lin avide,
kortuŝite kaj ravite
Esperanta mond'.

Pro sopir' de l' kor' ciklona
pri la vera Homo Homa
ŝanĝas lia kant',
sed konsolon al viktimo
de la dorna ampilgrimo
donas Esperant'.

Kantu, Baghy, nia bardo.
bardo de sincera ardo,
kun antaŭa fort';
vian larman emocion
kaj fajreran ironion
aŭdos sud' kaj nord'.

Al K. Kolocsay

Vin, poeto-konkeranto,
ni admiri kaj admiros,
dum ekzistos Esperanto,
via nom' lumture brilos.

Vi kun fajro kaj gracio
majstre streĉis koro-kordojn,
al tutmonda poezio
vaste vi apertis pordojn.

Enpenetris ĉiun sferon
via Muzo temerare,
bombardante eĉ Inferon
venkis vi miraklofare.

Dolĉaromas viaj floroj.
loge pompas kaj eternas.
... Antaŭ vin en niaj koroj
ni omaĝon nian sternas.

Edith Södergran

1892 – 1923

el ŝia poemaro
Lando Malekzista
traduko de Sabira Ståhlberg



Edith Södergran ne postlasis multon krom siaj poemoj; restas al ni iom da fotoj kaj leteroj.

Ĉar Edith bruligis siajn paperojn, por ke ili ne falu en la manojn de la "kadavrovermoj, kiuj verkas biografiojn", kiel ŝi esprimis sin.

La ago efikis male: pri la "mistera" Edith ekzistas amasoj da biografioj, psikologiaj analizoj kaj studoj – ŝi hodiaŭ same aktualas por sciencistoj, verkistoj kaj la granda publiko kiel antaŭ 80 jaroj.

Edith Irene Södergran naskiĝis en Sankt-Petersburgo. Ambaŭ gepatroj apartenis al la svedlingva minoritato de Finnlando.

postlasis – efterlämnade
restas al ni – vi har kvar

bruligis – brände
kadavrovermoj – likmaskar
verkas – författar

ago – handling; efikis – fick effekt
male – motsatt

sciencisto – vetenskapsman

apartenis al – tillhörde

Ŝia patro Matts mortis pro tuberkulozo en 1907. Edith kaj ŝia patrino Helena vivis tiutempe en Sankt-Peterburgo, kie Edith iris al prestiĝa germanlingva lernejo.

Jam tiam ŝi ekverkis, ĉefe germane, ruse kaj france – ni hodiaŭ povas legi la fruajn poemojn en la kolekto *Vaxdukshäftet* (Vakstola kajero).

Tamen ŝia lernado finiĝis abrupte: en 1909 malkovriĝis ankaŭ ĉe Edith tuberkulozo.

Ŝi sendiĝis al sanatorio en Finnlando.

Poste ŝi kaj Helena vojaĝis al Davos, Svislando, de kie ili faris vizitojn i.a. al Italio. En 1914, sojle de la unua mondmilito, ili revenis por ĉiam al Raivola.

La vojaĝoj estis turnopunkto por Edith: ŝi havis la okazon konatiĝi kun la plej modernaj literaturaj "fluoj" sur la kontinento, kaj ŝi trovis sian poezian voĉon.

Nun Edith verkis en la sveda, kiu ankaŭ restis ŝia poezia lingvo. Iam en tiu periodo ŝi decidis eldoni siajn poemojn. Ŝi kontaktis en Helsinko plurajn eldonistojn, sed nur en 1916 Holger Achildt akceptis ŝian unuan poemaron.

Ĝi skuis la finnlandan kulturmondon: poemoj sen rimo, sen ritmo...simple ne povas esti poemoj!

En 1917 eksplodis Rusio, kaj la familio Södergran perdis sian tutan havaĵon. Restis al ili nur la domo en Raivola.

Fine de 1917 Finnlando deklaris sian sendependecon, kaj Raivola fariĝis nun parto de la nova respubliko.

En 1918 komenciĝis interna milito en Finnlando. Edith, kiu sekvis de proksime la evoluon kaj en Rusio, kaj en Finnlando, publikigis la poemaron *Septemberlyran* (Septembra liro). La poemaro estas himno, ekstazo, superhoma verkaĵo en la spirito de Nietzsche kaj la revolucioj.

Nun oni malkovris Edith. Kelkaj kolegoj, kiel la poeto Elmer Diktonius, eĉ vizitis ŝin en Raivola. En 1919 eldoniĝis la poemaro *Rosenaltaret* (La rozaltaro – en Karelio oni starigis "rozaltaron")

tiutempe – vid den tiden

la fruaj poemoj – de tidiga dikterna

malkovriĝis ankaŭ – det visade sig också

i.a. – inter alie – bland annat
sojlo – tröskel; mondmilito – världskrig
por ĉiam – för alltid

turnopunkto – vändpunkt
okazo konatiĝi – tillfälle att bekanta sig med
fluo – flöde, strömning
voĉo – röst

verkis en la sveda – skrev på svenska
restis – förblev; iam – någon gång
decidis – beslöt; eldoni – ge ut
pluraj eldonistoj – åtskilliga förläggare

skuis – skakade om;

perdis – förlorade; havaĵon – egendom

fine de – i slutet av
sendependecon – oberoende

interna milito – inbördeskrig
sekvis de proksime – följde på avstånd
evoluo – utveckling; kaj...kaj – både...och
poemaro – diktsamling
himno – hymn,
superhoma verkaĵo – övermänskligt
författande; spirito – anda

malkovris – upptäckte

starigis – ställde upp

por naskiĝtagoj) kaj aŭtune la aforismoj *Brokiga iakttagelser* (Buntaj observaĵoj).

Edith dume transiris de Nietzsche al legado de Rudolf Steiner kaj antropozofio, supozeble pro influo de amikino. Pli kaj pli ŝi post tio interesiĝis pri la Biblio kaj la "pura kristanismo", kio ankaŭ videblas en la poemoj. En la malfruaj poemoj ofte aperas Dio kaj Kristo, kiam antaŭe aperis Eros' kaj anonimaj "venkantoj".

Dume la tuberkulozo serioziĝis pro malbona nutrado kaj mizero. Por travivi Edith kaj ŝia patrino devis forvendi preskaŭ ĉion el la domo kaj forlui sian grandan vilaon. En la komenco de 1923 Edith ŝajne sentis la proksimecon de la morto kaj bruligis la privatajn paperojn, leterojn kaj eĉ kelkajn manuskriptojn.

En la somermeza tago de 1923 Edith mortis 31-jara. Du jarojn pli malfrue, en 1923, aperis la lasta poemaro: *Landet som icke är* (Lando malekzista).

Jen kelkaj poemoj el tiu libro:

LANDO MALEKZISTA

Mi sopiras al lando malekzista,
ĉar ĉion ekzistan mi lacas avidi.

Luno rakontas per runoj arĝentaj
pri lando malekzista.

Lando, kie ĉiu deziro mirinde kontentiĝas,
lando, kie miaj ĉenoj falas,
lando, kie ni vunditan frunton freŝigas per
luna ros'.

Mia vivo iluziis brule.

Sed unu mi trovis kaj unu mi vere malkovris
– la vojon al la lando malekzista.

En la lando malekzista
mia amato portas brilan kronon.
Kiu estas mia amato? Senlumas la nokto
kaj steloj responde tremas.
Kiu estas mia amato? Kiu estas lia nomo?
Ĉieloj sin arkas pli kaj pli alten,
kaj dronas homido en senfinaj nebuloj,
respondon ne konas.
Sed homido estas nura certeco.
Ĝi etendas siajn brakojn preter ĉiujn ĉielojn.

naskiĝtago- födelsedag; aŭtune – på hösten

dume – under tiden; transiris – övergick till

influo de – inflytande av
pura – ren

aperas – gestaltas, blir synlig
kiam antaŭe – liksom tidigare
anonimaj venkantoj – anonyma segrare

nutrado – mathållning; travivi – överleva
forvendi – sälja ut; preskaŭ ĉion – nästan allt
forlui – hyra ut; vilao – villa
ŝajne – tydligen; sentis – kände
proksimecon – närmande, annalkande; morto
– död;

la somermeza tago – midsommardag

jen kelkaj poemoj el tiu libro – här är några
poem ur den boken:

LANDET SOM ICKE ÄR

Jag längtar till landet som icke är,
ty allting som är, är jag trött att begära.
Månen berättar mig i silverne runor
om landet som icke är.

Landet, där all vår önskan blir underbart
uppfyllt,

landet, där alla våra kedjor falla,
landet, där vi svalka vår sargade panna
i månens dagg.

Mitt liv var en het villa.

Men ett har jag funnit och ett har jag verkligen
vunnit – vägen till landet som icke är

I landet som icke är
där går min älskade med gnistrande krona.
Vem är min älskade? Natten är mörk
och stjärnorna dallra till svar.
Vem är min älskade? Vad är hans namn?
Himlarna välva sig högre och högre,
och ett människobarn drunknar i ändlösa
dimmor
och vet intet svar.

Kaj venas respondo:
Min vi amas kaj ĉiam vi amu.

LA TAGO FRISKAS VESPERIĜE

III

Unuafoje mi vidis mian mastron hodiaŭ,
tremante mi tuj lin rekonis.
Jam mi sentis lian pezan manon sur mia brako
leĝera.

Kien fuĝis mia rido tinte virga,
mia ina libero fierteniga?

Jam mi sentas lian firman prenon de mia
vibranta korpo,
jam mi aŭdas la realon dur-resonan
kontraŭ miaj fragilaj, fragilaj revoj.

IV

Vi sercis floron
kaj trovas frukton.

Vi sercis fonton
kaj trovis maron.

Vi sercis virinon
kaj trovis animon –
vi elreviĝis.

Men ett människobarn är ingenting annat än
visshet.

Och det sträcker ut sina armar högre än alla
himlar

Och det kommer ett svar: Jag är den du älskar
och alltid skall älska.

DAGEN SVALNAR

III

Jag såg min herre för första gången idag,
darrande kände jag genast igen honom.
Nu känner jag ren hans tunga hand på min
lätta arm...

Var är mitt klingande jungfruskraut,
min kvinnofrihet med höguret huvud?
Nu känner jag ren hans fasta grepp om min
skälvande kropp,
nu hör jag verklighetens hårda klang
mot mina sköra, sköra drömmar.

IV

Du sökte en blomma
och fann en frukt.

Du sökte en källa
och fann ett hav.

Du sökte en kvinna
och fann en själ –
du är besviken.

Laboro por la esperanto-biblioteko en Stannum



Ingegerd fotis

1. Lasse Granat
boras.

2. Pro la
aerdehumidigilo
la libroj bone
fartas.






3. Novaj bretaroj faritaj de Lasse por libroj, kiuj antaŭe troviĝis en la urba biblioteko.

Tie oni forigis librojn, kiuj ne estis sufiĉe pruntitaj.

La sama sorto okazis al francaj, germanaj kaj aliaj "fremdlingvaj libroj". Ĉu la angla estas "fremda lingvo" en Svedio? Mi dubas.



Inga Johansson savis la esperantajn librojn kaj nun ili finfine havos lokon en Stannum, ĉar nia areo iomete pligrandiĝis ĝis 20 kvadrataj metroj.

La tuta mondo ne povis akordiĝi pri la ordo de la titoloj sur la librodorsoj. En kelkaj landoj – ekz. Anglio, Francio, Nederlando, Danio kaj Svedio – la titolo komenciĝas je la supro. En aliaj landoj – ekz. en Germanio, Rusio, Japanio, Ĉinio, Argentino, Hispanio, Bulgario,

Pollando – oni komencas skribi la titolon de malsupre. Tamen mi trovis kelkajn esceptojn.


Eble estas bone por bibliotekistoj. Ili ne turnas la kapon en la saman direkton la tutan tempon.

Mi atendas inventon de iu geniulo por igi la librojn mem stariĝi laŭ alfabeto sinsekvo.

/Siv

Sugesto pri legado

de Monica Eissing



Mi legis la eŭskan infanlibron **Momolo** de Antton Kazabon.

Ĝi temas pri la knabo Momolo, kiun oni longtempe kaj ofte mokis en la lernejo. Li estas dikulo kaj ne estas saĝa sed ankaŭ ne stulta, kiel aliaj knaboj.

Unu tagon li decidis ŝanĝi tiun situacion. Li volas ke liaj kunlernantoj respektu kaj ŝatu lin.

Post la somerferioj li venis kun renovigitaj fortoj. Li prenis helpon de knabinoj en la klaso por venĝi kontraŭ la kvin knaboj. Momolo venĝis unuope, ĉar ili ne estas bonaj al li. Kio okazis al ili, mi ne volas rakonti ĉi tie. Vi volas legi mem.

La libro estas tradukita el eŭska lingvo. A. Kazabon (n.1954) estas instruisto kaj verkis preskaŭ 90 librojn, ĉefe por infanoj.

La libro estas eldonita de Eŭska Esperanto Asocio. Vi povas mendi la libron de UEA kaj kosta EUR 9:

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9240>

Troviĝas ankaŭ aliaj infanlibroj de aliaj verkistoj, tradukitaj el la eŭska lingvo en

esperanto sub kolekto Lunlumo. – Erroteta pri la verkisto:

https://eu.wikipedia.org/wiki/Antton_Kazabon

2020 06 03 /Monica

El la Lingvo Internacia junio–julio en 1896

Mi serĉis, serĉadis por trovi spurojn de iu virino en ĉi tiu duobla numero. La sola artikolo *pri* virino (*de* virino ne troviĝas) temis pri virino, kiu forferis sian amon al viro por dediĉi sian vivon al Dio ("Monahino de Proĥoroviĉ-Koĉmarenko).

Do, mi turnas min al **L.L. Zamenhof**, kiu havis multe da leterkontaktoj kun la legantoj de "Lingvo Internacia". La titolo de la artikolo de Zamenhof estas "Memstareco".

Paĝo 102: 'Ĝis nun oni povis ankoraŭ timi, ke nia afero vivos nur tiel longe, kiel vivos ĝia iniciatoro; nun kiam la afero jam ses monatojn iras tre bone tute sen mia enmiksiĝado, la supre esprimita timo tute malaperas kaj nia afero metis jam sian piedon en la eternecon.

Estas tre dezirinde, ke la senpersoneco kaj memstareco de nia afero ĉiam pli kaj pli fortiĝu; tial mi nun penas detenadi min de ĉia gvidanta partoprenado en nia organo. Mi okupas min nur je konstanta registrado kaj adresokolekto de ĉiuj esperantistoj kaj la eldonado de la "Biblioteko" de la lingvo Esperanto.'

Por la eltiro respondecas Siv.



Ferenc Jáki, 1919–2010



Hungara esperantisto, kiu vizitis Gotenburgon en 1986 – *informo de Inga Johansson.*

El Wikipedio: Ferenc Jáki estis emerita gimnazia instruisto, doktoro pri klasika filologio. Li lernis Esperanton en kurso de Julio Baghy en 1961.

Li havas grandajn meritojn pri la ŝtata rekono de Esperanto en Hungario, ĉar li, kune kun la forpasinta prof. Szerdahelyi,

iniciatis la leĝigon de la elekto de Esperanto kiel studobjekto en hungaraj lernejoj kaj starigon de Ŝtata Ekzamenkomisiono,

kiun li prezidis ekde 1967 ĝis 1998. Membro de Hungaria Esperanto-Asocio ekde 1964, li estis ties estrarano kaj komitatano dum pluraj mandatoj. Jáki ankaŭ tradukis el la

hungara, prelegvojaĝis, kaj instruis Esperanton laŭ la Cseh-metodo en pluraj landoj. Li verkis versojn, arte skulptis, pentris, fotis.

Poemo de Ferenc Jáki

Batu, koro, batu...

Batu, koro, batu...
ĝis kiam vi povas,
ĝis kiam per bato
vi nur ĝojon donas
al mi kaj al ĉiuj,
kiujn mi tre amas,
kun kiuj mi kune
ridas kaj ploradas.

Kun amikaj koroj
batu vi laŭritme,
gardu vin kaj bati
ne ĉesu rapide,
ne frue, ankoraŭ
atendas min ĝojo
estas jam donaco
por mi ĉiu horo.


Kaj tiam, kiam vi
lastan baton batos,
kaj kiel kandelo,
lastfoje vi flamos,
poemon al tiuj
donu, kiujn amis,
kun kiuj mi kune
ridis kaj ploradis.

*verkis al amikoj
dro Ferenc Jáki – 1983*



Traktato pri kato

de Malej B.Ar.



Bonvenon al Esperanto-TTT-ejo! (rusa ligilo)

Alternativaj adresoj:

esperanto-mv.pp.ru, esperanto.mv.ru, esperanto-mv.narod.ru.

Responda eldonanto: Jurij Finkel Юрий Финкель

”Mi naskiĝis la 4an de marto de 1964 en Uljanovsko (Rusio). Finis la raditeĥnikan fakultaton de la politeĥnika instituto en 1986, ekde tiam laboras kiel programisto. Esperantistiĝis en 1989. Komencis tradukadi rusan beletron en Esperanton ĉirkaŭ la 2000a jaro”.

DIRAS LA FABEL’ pri jeno:
Foje kato dum promeno
Trovis en loĝej’ najbara
kelkajn paĝojn el vortaro.
Kaj ekpensis nia kato
Pri vorteto nekonata:

Miris kato sen arogo –
Kio estas «**katalogo**»?
Katon logas, nu, finfine,
Lakto, fiŝo aŭ katino.
Stranga tamen tio estas
Ke vortaro tuj protestas

Kato sekvan vorton prenis,
kaj iome ekĉagrenis:

«**Katafalko**» – bela vorto,
Ĝi atestas ne pri morto,
Sed pri moro forgesita,
Kiam kat', danĝerojn spite,
En kampar' kun falkoj ĉasis...
Ve jam tempo tiu pasis.

Eĉ de l' terminar' ŝatata
Restis sole vort' «**muskato**».
Sed por ĉasi muson bone,
Ne bezonas falkojn oni.

Poste sekvas vort' «**kataro**»,
Jen, la senco estas klara:
Aparteca kaj privata
Estas viv' de ĉiu kato.
Tamen en la historio
Iam rondo familia
Estis katoj (ne homaro!).
Forta estis la kataro!



Tute ne pri oceano
Temas nun «**katamarano**».
Pensis kat' kun granda tristo:
Estis vorto «**kat-maristo**»...

En antikvo katoj gloraj
Al la landoj vagis foraj.
Oceanoj, maroj, famo...
Ve! foriĝis por ĉiamo.

Nun amaras ĉiu kato,
Kaj konstanta kata stato –
Kat-amara asocio,
Sed ne rondo familia.

Dolorigas tiu fakto,
Ĝin forigu «**katarakto**»!
Ĉiuj katoj devas kune
Akti por la bon' komuna,

Ke la tradicioj kataj
Ne plu estu forgesataj.
Pro pigreco tro, certe,
Kraĉas katoj vivosperton,

Konformiĝas al naturo
Kaj forgesas pri kulturo.
Eĉ de la iamaj modoj
Fakte restis nur «**katodoj**».

Odojn tiujn dum printempoj
Oni aŭdu de tegmentoj.

Ne bezonas kat' vortaron,
Ĉio estas tute klara.
Eĉ oscedis ĝi enue –
Senco mankas legi plue.

Kaj ekdormis ĝi sur sofo.
Do, finiĝis **katastrofo**.

20-maj-1998

Transpiranto

Inga Johansson sendis la jenan informon pri Grönköpings Veckoblad, gazeto, kiu ŝercis – kaj ankoraŭ ŝercas – pri Esperanto per Transpiranto. Foje ĝi estas eniro al parolo pri Esperanto, foje nur ilo por diri ke "Esperanto estas nur inventita lingvo" kaj ne valoras ke mi lernu ĝin! Tamen Transpiranto iel popularigis Esperanton. Troviĝas kantoj en transpiranto. Transpiranto estas fikse ligita al la sveda kun esperantaj trajtoj kaj eble estas nur svedparolantoj, kiuj tute komprenas la amuzaĵojn.

TRANSPIRANTO estas fikcia esperantido. Ĝia nomo povus veni el *trans* kaj *spirito*, sekve Transpiranto estus la lingvo kiu iras trans la spiritoj por malgrandigi la distancojn inter la spiritoj. Sed, kompreneble, "transpiranto" venas el "transpiri", t. e., ŝviti.

Laŭ Per Aarne Fritzon, de komenco de 20-a jarcento (ĉirkaŭ 1905), aperas en Svedio la satira gazeto "Grönköpings Veckoblad" (la semajngazeto de Grönköping) kiu prezentas karikaturon pri aktualaĵoj kaj fenomenoj en la

sveda socio. (Laŭ la vortaroj de Vilborg kaj Nylèn Grönköping = Abdero, Birgitta Anevik atentigas nin.)

Transpiranto estus kreaĵo de "elementlernejestro Ludvig Hagwald" (aŭ kiel li mem transpirantigas sian nomon – "Ludoviko Hagvaldo") en 1930, kio koincidis kun relative forta ondo de priesperanta intereso en Svedio.

La tradukoj de konataj svedaj versaĵoj tiom amuzis la legantojn, ke en preskaŭ ĉiu numero de la gazeto daŭre aperas nova

transpirantaĵo. Transpiranto estas sukcesa "planlingvo" en almenaŭ tiu rilato, ke tre granda procento el la svedoj scias citi iun version en ĝi.

Transpiranto estas miksaĵo de Esperanto, sveda lingvo kaj kelkaj vortoj el aliaj lingvoj. La gramatika bazo de la lingvo estas, kompreneble, la sveda ĉar la "lingvo" celas atingi la svedajn legantojn. Kurioze, multaj originaj verkoj de Esperanta literaturo estas "transpirantigitaj", kaj estas konataj de svedoj per transpiranta versio.

Grönköpings Veckoblad

La logotipo de Grönköpings Veckoblad.

Tu ist unik (Transpirante)

Tu ist sekret voyeur, il unika,
Trotz nemo parlat, tu hajas suplika.
Maj suktan ist solo tu. Si tu spikas
un glossa minimal, aj ist toj.

Tu ist l'unika aj nix amnesias,
Toj trut, toj pupill et toj vox sedativa,
et ergo æskas nunk: Si tu spikas
un glossa minimal, aj ist toj.

Nemo kvam tu, trotz rival-disponerad,
Tu donas amore, baj toj aj parkeras!
Maj fata ist essere toj in maj teori,
Parte del glob qvis ist toj.

Ĝuu la esperantan version de tiu kanto kun la nomo: "La tempo de espero"! Kantas Mariusz Domaszewicz:

<https://www.youtube.com/watch?v=hHV-DBjRhE4>

Jen finna ĥoro kantante ĝin en transpiranto:

<https://www.youtube.com/watch?v=YEOnn5by4x0>

Du är den ende (Svede)

Du är den ende, som hemligen ser mig.
Fast ingen har talat, du vet vad jag ber dig.
Min längtan är bara du. Blott du mig ger
ett enda litet ord, är jag din.

Du är den ende, jag aldrig kan glömma
din mun, dina ögon, din lugnande stämma,
och därför jag ber dig nu: Blott du mig ger
ett enda litet ord, är jag din.

Ingen annan som du, fast du hör till en annan,
skänker mig kärlek, hos dig vill jag stanna!
Mitt öde det är att bli din i min fantasi,
dela den värld som är din.

Sube tri versioj de fama kanto de Povel Ramel. Esperanta traduko de Franko Luin.

Povel Ramel kantas "Underbart är kort":

<https://www.youtube.com/watch?v=YPbVwXw80u0>

Underbart är kort – Tuj ĝojo estas for – Corto ist klimax

Svenska:	Esperanto:	Transpiranto:
<p>Bara en enda ros på ett evigt klänge så är livet trist varar länge men underbart är kort – alldeles för kort.</p> <p>Följer du ödets väg genom mörka gränder når dig solen en glimt i sänder ty underbart är kort – alldeles för kort.</p> <p>På var sommaräng du finner bara en lyckoklöver någonstans och likaså en enda gång du möter just den vän du behöver så grip din chans, men fort – innan den flyr bort underbart är kort – alldeles för kort.</p>	<p>Nur unu sola roz' ĉe eterna rojo estas vivo, daŭras malĝojo tuj ĝojo estas for – tro subite for.</p> <p>Se pelas vin la sort' la malluman vojon, trafos suno vin unu fojon tuj ĝojo estas for – tro subite for.</p> <p>En somerherbej' vi trovos unu kvarfolion nuran, prenu ĝin kaj same unu nuran fojon trovos vi amikecon puran, retenu ĝin, aŭ ĝi restos nur memor' ĝojo estas for, tro subite for.</p>	<p>Corto ist klimax Una unik rosett sür lian perenna Sic ist' vita, long ist' gehenna, doch corto ist klimáx – troppo infra max.</p> <p>Si fatalist tu via la slum flaneras, solo næppe toj penetreras für corto ist klimáx – troppo infra max.</p> <p>In sjack pastorat tu fündas solitær timoteja irgendwo, et ebenfals ein solo tajm tu dejtas necessær toppentjeja, so passa peau! Doch strax ante wæck il flax, corto ist klimáx – troppo infra max.</p>


Ludantaj pensiuloj

Dum promeno en Gråbo, Ingrid kaj mi vidis ĉi tiun ŝildon
ĉe bieno:

”Konduku malrapide!
Ludantaj pensiuloj” /Siv



Somera ludo – boule... aŭ petanque



Ekipado:

Kunprenu: globojn el fero, unu "etulon" el ligno, mantukon por purigi la globojn antaŭ ol remeti ilin en skatolon, mezurbendon por esti certa pri kies globo(j) kuŝas plej proksime al la etulo. Ankaŭ korbo kun kafo – aŭ almenaŭ akvo decas.


En Grãbo la klubo pro la covid-19 ĉesis ludi, sed la kvin "globejoj" restas kaj se du aŭ kvar personoj uzas unu el la globejoj oni espereble ne riskas infekton. Antaŭ la hejmenirado – rastu la ludejon, por ke ĝi estu preta por novaj ludantoj.

Ĉi tiu filmo helpas vin kompreni la regulojn. Bonan trejnadon! / Siv

<https://www.youtube.com/watch?v=7wnL4OUBGxk> Preterlasu la reklamon!

Horloĝa matematiko

En Facebook troviĝas filmo pri horloĝa matematiko, sed mi ne retrovis la ligilon. /Siv



1) Adicio:

$$\begin{aligned} 11 + 1 &= 12 \\ 10 + 2 &= 12 \\ 9 + 3 &= 12 \\ 8 + 4 &= 12 \\ 7 + 5 &= 12 \\ 6 + 6 &= 12 \end{aligned}$$

2) Subtraho:

$$\begin{aligned} 12 - 6 &= 6 \\ 11 - 5 &= 6 \\ 10 - 4 &= 6 \\ 9 - 3 &= 6 \\ 8 - 2 &= 6 \\ 7 - 1 &= 6 \end{aligned}$$

3) Adicio:

$$\begin{aligned} 12 + 1 &= 13 \\ 11 + 2 &= 13 \\ 10 + 3 &= 13 \\ 9 + 4 &= 13 \\ 8 + 5 &= 13 \\ 7 + 6 &= 13 \end{aligned}$$

Kuleto flugas

trovita en Facebook

Naskiĝis kuleto kaj, dum kelkaj tagoj, patrino trejniĝis ĝin al flugo. Hodiaŭ ĝi memstare flugas. Post ĝia reveno, patrino demandas:

- Kiel vi flugadis?
- Ŝajne tre bone, ĉiuj aplaŭdis min!



Piei Hein, Danio, skribis poemon kun la sama temo, sed ne temas pri kuloj, sed tineoj:

TINEA PANTOMIMO

Eble tineoj erare konkludas:
Homoj respektas nin laŭde,
Ĉar ekvidante tineon salutas
Ili per manoj aplaŭde.

La jenan poemon Piet Hein skribis multajn jarojn antaŭ la korona-tempo, sed ĝi aplikeblas en ĉiu krizo:

Humuro en kriza tempo

La temp' terura estas, ve!
Sed optimisto restas mi ĝisoste.
Konsolas min konstante, ke
pli bone estas nun, ol iĝos poste.

La veraj Bonoj de Piet Hein

La verajn bonojn ĉiam ni kulturu –
ne tuŝas ilin rust', tineoj, aĝo.
Sed ili plifortiĝas en futuro,
kiel ekzemple biero kaj fromaĝo.

/Siv

Tri poemoj de Siv Burell el Penseo

Ĉu oni rajtas esti si mem?

Ĉu oni agu laŭ sia vol',
ne devi afektite rideti ?
Por mi la bonmaniera parol'
ŝajnas false preteti.

Eble oni foje ofendas
bonkoran invitemulon,
sed laŭtempe respektendas
ĉiun honestulon.



Kommunicera mera!

Att förstå sig själv
är nyckeln till att förstå
hela mänskligheten
I livets stora älv
öde läggs till öde då.

Kommunicera mera
så blir intrycken flera!
Din hjärna förbättras
om ord inte fjättras
i stereotypa banor
Res fria ordets fanor!

Viktigast på denna jord
är ord, ord och åter ord!

Via sorto estas justa

Via sorto estas justa
Vi mem elektis—
La universitaton aŭ la bazlernejon.
Akceptu
Kun ĝojo!

Komuniku pli!

Kompreni sin mem
la ŝlosil' al kompren'
de la tuta homaro.
Trovigās en la vivrivero
diversaj sortoj sur tero.

Komuniku senĉese
kaj impresoj pliigās
via cerbo vigligās
se vortojn ne obstakloj
baras, sed mirakloj
formas komunikon senĉese.

Pli gravas sur tero
vortoj en sincero.

La amara
Eble estis
Ekzameno.

Poemo de Hans-Georg Kaiser, Germanio

El Penseo n-ro 343

La kolera pomo

Temas pri vi, temas pri ni –
ne plu manĝu, hom', de mi!
Min ne manĝu kun obstino
tio estas mia fino!

Temas pri mi, temas pri ni –
hom', ne manĝu plu de mi!
Mi ja povis vin kompreni,
sed ne povas min deteni.

Temas pri ni, temas pri mi,
kanibalo estas vi!
Min ne voru, homo fia!
Mi ne estu manĝo via!



Vegetaranoj troviĝas, veganoj troviĝas... sed pli... ????

Pomo estas ja la simbolo de scienco.

Ne manĝu sciencon????

/Siv

Vortoj de l' tago de Hans-Georg Kaiser

El Facebook: El la ora libro de l' spontanaj diroj 02

- Kiel okazas, ke fine de la monata salajro restas ankoraŭ tiom da monato?
- Kiu ne scias, kion li volas, sciu almenaŭ, kion la aliaj intencas fari.
- Kie ni estas, estas antaŭe, sed, se ni foje estas malantaŭe, jen malantaŭe estas antaŭe.
- Komprenu, ne nur studu.
- La borado en la nazo ne estas pruvo, ke oni pensas.
- La ĉefa kaŭzo de malbonaj notoj estas la lernejo.
- Oni ĵetu la enlandanojn el la lando – jen poste estos paco!
- La kara Dio vidas ĉion – sed la najbaroj eĉ pli.
- Laboro estas la pereco de la drinkanta klaso.
- La plej bona nacio estas la rezign-nacio.
- Libera estas tiu, kiu celas tion, kion li devas fari.
- Mia opinio estas jam firmigita, ne konfuzu min per viaj faktoj.
- Mi diras, kion mi pensas, por ke mi aŭdu, kion mi scias.
- Mi ne estas malkuraĝa, mi estas nur pli forta ol la kuraĝulo en mi.
- Mi respondas per decidita: Eble.
- Modesteco estas la arto lasi la aliajn eltrovi, kiel grava oni estas mem.
- Mono por si mem ne feliĉigas, vi devas posedi ĝin.

- Nenio estas malebla por tiu, kiu ĝin ne devas fari mem.
- Ne sufiĉas ne havi propran opinion, necesas aldone, ke oni ankaŭ ne kapablas esprimi ĝin.
- Niaj antaŭuloj ankoraŭ iris en la arbarojn, sed ni veturas tien per aŭtoj.
- Ni ŝparu, kiom ajn kostas!

Rimarko: Tiajn dirojn oni faris en Germanio, kiam nia iama germana ministro por eksteraj aferoj, Josef Fischer, faris ankoraŭ politikon kun sportŝuoj kaj sen kravato. Estas tielnomataj Sponti-diroj, do diroj de spontanuloj. Kiam Fischer komencis vesti sin kun kostumo kaj kravato kaj fariĝis registarano, finiĝis la tempo de la spontanaj diroj. (HGK)

El Heroldo de Esperanto



Heroldo nun centjara!

Ĉi tiu gazeto estas nun senpaga. Libervola subtena donaco por KCE estos bonvena tra ĝia svisa konto.

El la gazeto mi (Siv) prenas la jenan:

★ Esperanta PEN partoprenos en la Internacia Konferenco pri Poezio en Slovenio, 22–25 sep 2020.

En aŭtuno ĝi reprezentos nian literaturon en **la verkista mondkongreso, kunvokita al Svedio. Por tiu evento estas eldonota la svedlingva verko de Giorgio Silfer kaj Bertil Nilsson Esperanto-folkets korta kulturhistoria (Konciza kultura historio de la E-popolo).**

★ Civitano Frederiko Nimubona, prezidanto de **Societo Internacia por Paco Universala**, komunikis ke la registaro de **Burundio** ekzamenas la eblecon ĝeneraligi la instruadon de Eo en la tuta eduka sistemo. Nuntempe eblas instrui Eon ekde la sepa

klaso de la fundamenta ciklo, nome ĝi havas kvinan pozicion post la runda, franca, angla kaj svahila.

★ Ega risiko super EU.

(Tralegu la artikolon. Ĝi estas interesa!)

Jean Monet kutimis diri ke la unuiĝo de Eŭropo formiĝas dum la krizoj. Kaj ĉar la nunan krizon alportis viruso el Popola Ĉinio, indas memori ke la ĉina ideogramo por krizo konsistas el du partoj, kun du specifaj signifoj: danĝero kaj ŝanco. La danĝero estas evidenta, la ŝanco malpli.

La nuna krizo montras la mankon de komunaj eŭropaj servoj: civila protektado, migroflua strategio, kaj tiel plu, plus sufiĉa kapitalo por funkciigi ĉion ĉi.

Kion estas faranta EU por helpi al la plej trafitaj membroŝtatoj? Simple ĝi permesas ke ili enŝuldiĝu pli. Estus kvazaŭ post katastrofa tertremo oni dirus al detruita civito: por rekonstrui vian urbon enŝuldiĝu pli multe, kaj tiel vi bankrotos pli frue.


La unuiĝo de Eŭropo pasas tra la disponeblo de la pli riĉaj helpi al la pli malriĉaj; certe germanoj ne ŝatas pagi por grekoj kaj italoj, sed Germanio devas memori ke, okaze de financa krizo, la kapitaloj iras de la pli malriĉaj al la pli riĉaj: ĉar oni aĉetos germanajn bilojn, kaj Germanio tiel gajnos, pagante negativan interezon. Se Eŭropa Unio ne funkcias tiurilate, la bezonanto serĉas helpon aliloke: Italio (la plej fidela al Usono dum la malvarma milito) sin turnas al Ĉinio kaj Rusio, Hispanio petas la intervenon de NATO; sed tiel profiliĝas novaj scenaroj en la internaciaj rilatoj, kiuj iom post iom marĝenigos Eŭropan Union.

La kredita krizo de 2008 kreis konsenton por la antieŭropistoj, des pli la migroflua krizo de la lastaj jaroj; tria krizo, nome la nuna, povus konduki al antieŭropisma majoritato ĉie, inkluzive de Francio kaj Germanio.

Giorgio Silfer, vickonsulo pri financoj

HEROLDO DE ESPERANTO, monata gazeto de kultura centro esperantista, Numero 5 (2308), 96 Esperanto-Domo, Postiers 27, CP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando) – telefono (41)32 9267407 – kce@esperantio.net – IBAN: CH63 09000000230029218 a jarkolekto majoj 2020 H

Nenio nova sub la suno




Vi kiu ankoraŭ troviĝas en la "laborvivo" ĉu ĉi tiu ne ŝajnas tre aktuala?... sed ĝi estas skribita de la romia verkisto Galius Petronius, mortinta en la jaro 66 post Kristo, 39-jara.

La teksto: "Ni streĉe trejniĝis – sed ĉiun fojon, kiam ni komencis krei funkciajn grupojn, ni devis esti reorganizitaj.

Mi lernis pli poste en la vivo, ke ni emas renkonti ĉiun novan situacion per reorganizado kaj mi ankaŭ lernis, kian mirindan evoluigon tio estas por krei la iluzion de progreso, tamen ĝi igas ĥaoson, mankon de efikecon kaj senmoraligon".

/Siv

Merlo kantas al Magnus ĉe lago Stora Lövsjön




Tiel kantas la merlo al homo:

<https://www.youtube.com/watch?v=Bg6imB0MeTM>

Tiel muzikas la homo pri merlo:

<https://www.youtube.com/watch?v=pG8uQu7Ykhk>



ĜIS ĜIS MERLO! (Bye, bye blackbird!)

Iras mi al hejmteren',
for de ĝen' kaj ĉagren'.

Ĝis, ĝis Merlo.

Kie ŝi atendas min,
dolĉulin', ĉarmulin',
Ĝis, ĝis Merlo.

Tie ĉi neniu min komprenas;
Nur por min trompeti entreprenas.
Jam ĉi nokt' en hejma lit',
vere kaŭz' por ekscit'
Merlo, ĝis, ĝis!

„La malfruiĝinta najtingalo” venis kun saluto

de Elwira Twardowska el Pollando



LA MALFRUIĜINTA NAJTINGALO *

Sur la hejma akaci' najtingalino plendas,
Vane najtingalon ĉi vespere ŝi atendas.
Ĉiam je la naŭa li revenas akurata,
Jam la dekunua — sed ne venas la amata!

Pretas sup' el muŝoj en la roso vesperhora,
Ses farĉitajn kulojn garnas saŭco majoflora,
Boskombraĵo spicas papilion sur rostilo,
Por deserto tort' zefira en la lunobriilo.


Ĉu okazis io? Oni eble lin perfortis?
Grizajn plumojn plukis, la arĝentan voĉon tordis?
Pro envio! Band' alaŭda kaŭzis ĉi hororon:
Plumoj certe ja rekreskos, sed la voĉ' — trezoro!

Jen la najtingalo venas, gaje hopas, pepas...
„Mi ja ploras! Kie flirtas vi kaj kie ŝvebas?”
Li retilas: „Kara, la vesperon mi admiris,
Tiom belas ĝi, ke mi piede hejmen iris!”

Trad. Andreo Rajska

* „Bulteno de AEP“, 1955

Elwira rakontas:



”Feliĉe nia vivo komencas malrapide revenadi al la normo. Iom strange, ĉar kiam oni anoncis pandemion estis en Pollando dekono de malsaniĝoj kompare al hodiaŭ. Tamen laŭ nia ministro ni estas la plej sukcesaj en batalado kun kronviruso, do restas al ni kredi liajn vortojn kaj ĝoji, ke ni estas sanaj.

Laste malgrandiĝis ankaŭ kritikado de sveda metodo por kronviruso.

Sidante hejme mi trovas pli da tempo por legado kaj por mia balkono. Ĉio belege floras kaj la unuan fojon mi rimarkis ĉi tie paserojn. Mi eĉ ne supozis, ke tiuj birdetoj povas tiel alten flugi. Mi ne povas tion vidi, sed verŝajne ili havas neston ie apud mia fenestro. Mi provas foti ĉe mi vizitantajn birdojn, sed tio ne estas facila.

Nur mevoj kaj kolomboj estas bonaj modeloj. Ĝis kiam vivis mia hundo, kolomboj sciis, ke la balkono estas mia kaj mi malpermesas adopti ĝin al kolombejo.



Nun mi mem devas protekti ĝin forpelante kolombojn. Mia bofilino konsilis min pendigi CD-diskon por fortimigi ilin. Mi faris tion sed tute sensukcese, mi eĉ pensas, ke tio plaĉis al ili. La problemon solvis pigo, kiu forŝtelis la diskon.

El interesajoj ankoraŭ unu. En la maro estas multaj postmilitaj danĝeraj restaĵoj. Hieraŭ oni malutiligis unuton bombon. Estis tre komplika kaj danĝera operacio.

Estis fermitaj ĉiuj strandoj, oni unue forpeladis ĉion vivantan kaj tagmeze eksplodigis la bombon. Ĉio havis feliĉan finon.

Aparte mi sendis al Vi versaĵon de fama pola poeto Julian Tuwim, *La malfruiĝinta Najtingalo*. Rimarku kiel bongusta menuo estas en ĝi. Al mi precipe plaĉas deserto, torto zefira en la lunobrililo.” (*Ĝi troviĝas en ĉi tiu numero.*)

Kaj la letero de Elwira finiĝas per Koraj salutoj al ĉiuj siaj ĝeamikoj en Svedio. /Siv




Ĉu vi konas la esperantaj nomojn de kutimaj sovaĝaj floroj?

https://svenska.yle.fi/artikel/2020/05/13/femtio-fragor-om-blommor-testa-hur-bra-du-kanner-till-vara-vanligaste-vilda?utm_source=facebook-share&utm_medium=social&fbclid=IwAR3aYZ

Vetamix, Finnlando, havas interesan teston pri kono de 50 sovaĝaj floroj. Se vi havas tempon – faru la teston laŭ la ligilo supre. Se vi volas nur lerni pri unu aŭ du – daŭrigu la legadon malsupre:

Vicio birda – kråkvicker



Esperante: Vicio birda; svede: Kråkvicker; norvege: Fuglevikke; dane: Muse-vikke; finne: hiirenvirna; angle: tufted vetch; germane: Vogel-Wicke; latine: Vicia cracca.

Vicio birda estas perena herbo, kiu povas esti longa je unu metro. Ĝi floras de junio ĝis la fino de aŭgusto. En Svedio la specio estas konata ek de la mezepoko. La romia verkisto kaj naturfilozofo Plinius la pli aĝa, naskita en Verono en la jaro 23 p.K. uzis la nomon "Vicia cracca" kiel fiherbon.

Vicio birda prefere kreskas sur sunaj ejoj kiel arbarrandoj, deklivoj, kampoj, vojrandoj – kaj

Foje, kiam vi troviĝas en malluma ejo, vi pensas ke vi estis enterigita, sed vi fakte estis plantita. — Christine Caine

(El la retpaĝo de Agneta Orlå.)

en mia ĝardeno!! Ĝiaj grimpobranĉoj plektas sin en la heĝojn.

Ranunculus ficaria – Svalört



Latine: Ranunculus ficaria; esperante: Fikario; svede: Svalört; norvege: Vårkål; dane: Vorterod; finne: Mukula leinikki; angle: Lesser Celandine; germane: Scharbockskraut.

Fikario estas perena kaj floras en aprilo – majo en la suda parto de Svedio. Rare en la norda parto. Ĝi povas kreski ĝis du decimetroj. En krizaj tempoj oni uzis la neĉefajn figsimilajn radikojn kiel panon post kuirado, sekigado kaj muelado. Fikario volas havi teron, humidan kaj riĉan je nutraĵo kaj ĝi kreskas en parkoj kaj arbaretoj. /Siv

El "Den virtuella floran" de "Naturhistoriska riksmuseet".



Pri diversaj profesioj



La ŝuisto: Ĉi tiuj ŝuoj bone vendiĝas. La kvalito bonegas, sed eble ili iomete dolorigos vin dum la unuaj tagoj.

La kliento: – Ne gravas, mi nur bezonos ilin la venontan semajnon.

La instruisto pri fiziko instruas teorie pri pligrandiĝo de longeco de diversaj metaloj.

Li faras strekon sur la tabulo, dirante: – "Jen fera drato!"

Poste li rigardas en la lernolibro, forprenas la strekon kaj faras novan.

– "Pardonon devus esti kupra drato".




Flegistino de la hospitalo admonas la novajn disĉiplojn ke ili ne parolu pli favore pri iu el la kuracistoj ol pri la aliaj.

Pli malfrue en la tago ŝi aŭdas disĉiplon, kiu telefone diras:

– Ni havas ses kuracistojn ĉi tie, sed bedaŭrinde mi ne povas rekomendi iun el ili.

- Kiu estas via profesio?
- Agronomo.
- Kiu estis via patro?
- Terkulturisto.
- Kaj via avo?
- Kamparano.





Dum milito kamparano estis kaptita. Post tempo li ricevis leteron de sia edzino, kiu plendis pri la malbona laboro en la bieno. Ŝi volis planti terpomojn, sed ŝi ne mem povis plugi.

La kamparano skribis al ŝi. "Bonas tiele. Lasu la kampon resti neplugita. Estas tiel ke en tiu kampo estas armiloj kaŝitaj.

Kvar tagojn poste venis al la bieno du kamionoj kun militistoj, kiuj trafosis la tutan kampon por trovi la armilojn.

La edzino skribis ekscititan leteron al sia edzo rakontante kio okazis. – Kion mi faru? Ŝi demandis.

Lia respondo estis: Metu la plantotajn terpomojn en la teron!

Hans-Georg Kaiser

Pro kio oni bezonas advokaton?



Interlingvistikaj studoj en Poznań

de Bengt Olof Åradsson

Iam antaŭsomere 2014 mi ricevis informon ke denove estos grupo kiu studos interlingvistikon en Poznań. Kvankam iom malfrue mi estis akceptita al la studoj. Bedaŭrinde mi ne povis partopreni la unuan sesion en septembro, do iom malfacile mi komencis la studojn, ĉar mankis al mi bazaj informoj kaj superrigardo pri la tuto. Sten Svenonius ankaŭ komencis la studojn kaj Ann-Louise jam en antaŭa grupo partoprenis, do mi ricevis diversajn helpojn de ili, precipe

materialon kaj librojn kaj informojn pri vojaĝeblecoj kaj tranoktado al kaj en Poznań.

La studoj temis pri interlingvistiko pere de Esperanto. Tio signifis ke Esperanto ne estis la ĉefa studobjekto sed helpilo kaj montrilo al pli ĝeneralaj temoj. Ni studis lingvajn erojn, inter alie fonemojn kaj morfemojn, vortkonstruadon kaj strukturojn de frazoj. Aliaj temoj rilatis al komunikado, planlingvoj, lingvoplanado ekzemple en multkulturaj/-lingvaj socioj kaj aplikoj de lingvoj, ekzemple en vortarfarado kaj terminologio.

Kelkaj temoj kompreneble ankaŭ rilatis al esperantaĵoj, ekzemple la historio de nia lingvo kaj la esperanta literaturo.

La studoj daŭris 3 jarojn kaj ni gestudentoj renkontiĝis unufoje ĉiun semestron, en septembro kaj en februaro, dum unu semajno. Tiu semajno komenciĝis per ekzamenoj de tiuj kvar temoj, kiujn ni studis hejme dum la pasinta semestro. Kutime ni havis ankaŭ kulturajn aŭ turismajn programojn kaj precipe post la septembra renkontiĝo okazis ARKONES.

Mi kaj Sten Svenonius estis bonŝancaj, ĉar dum nia studado Wizzair establis fluglinion rekte inter Malmö kaj Poznań. Tio multe faciligis la vojaĝon. Komence ni flugis al Gdansk, tranoktis tie, kaj poste daŭrigis per trajno al Poznań. Per la rekta vojo ni ŝparis kaj monon kaj tempon.

Rezulto, utilo, ĝojo, ĝuo k.t.p? Jes, mi sukcesis la finajn ekzamenojn, kvankam kelkfoje sufiĉe streĉa studado, ĉar samtempe mi laboris plentempe. La studoj laŭ la Bologna sistemo kutime estas planita je 100 %-a studado dum du jaroj, sed en Poznań estis dum tri jaroj, kio do signifas ke ni estis supozataj studi je ritmo de 66 %. La Interlingvistikaj Studoj ja egalas la

duan ciklon laŭ tiu sistemo, do la 4–5aj jaroj en la universitato.

Kelkaj kunstudentoj profesie povis uzi la atestilon post la studoj al nova posteno aŭ al pli alta posteno. Mi mem ne havis tiun celon. Mi simple volis pliprofondiĝi en Esperanto. Do iom mi surpriziĝis kiam mi ekkomprenis ke mi komence ne komprenis la enhavon de la studoj. Sed en ĉiu malbono estas iom da bono, kaj tiu bono kreskis kaj mi trovis la studojn tre interesaj. Ekzemple mi trovis ke ni havas grandan riĉecon en nia esperanta literaturo. Mi esperas ke ni esperantistoj pli multe legus el tiu trezoro.

Kroma ĝojo estis ekkoni tiom da interesaj homoj, studentoj kaj prelegantoj, loĝantaj dise en la mondo. Ilona Koutny faris nekredeble grandan laboron dum pli ol 20 jaroj, gvidante tiujn studojn kaj mi vere ĝojas ke mi kaptis la okazon ekstudi tie.

Kaj, grave estas, ke la studojn ebligis SEF per kontribuoj al la studkotizoj per siaj fondusoj. Grandan dankon!!!

Vi povas trovi pli da informo pri tiuj studoj ĉe: <http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko>

aŭ vi serĉu per Google: Interlingvistikaj studoj Poznań.

Somera programo en Greziljono ★ de la 3a ĝis 27a de aŭgusto

La franca Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono informas vin, ke ĉiuj kursoj planitaj en julio ŝoviĝis al aŭgusto.



2020-julio-27/31 – Verda Naturisma Semajno kun INOE kaj FFN

2020-aŭg-02/09 – la Verdaj Skoltoj tendumas, skoltumas, lignokonstruas

2020-aŭg-03/13 – 6-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (franclingve)

2020-aŭg-03/14 – 4-a Maratona Esperanto-kurso dum 7 ĝis 11 tagoj

2020-aŭg-10/14 – 32-a Internacia E-Konferenco post OSIEK « Naturo, Medio, Klimato, Scienco »

2020-aŭg-17/27 – 10-a Festa Semajno por infanoj, adoleskuloj kaj familioj

Aliĝoj: gresillon.org/aligho

Informoj: kastelo@gresillon.org

Bonvolu plusendi por informi viajn amikojn kaj vian E-grupon. Bonvenon al ĉiuj la teamo de Grésillon!

Brazila retkurso! Provu!

Ĉu mankas –r– en "Konversacia" aŭ ĉu estas maniero kuraĝigi komencantojn – la literumo ne tro gravas???

/ Siv



Agrablan someron deziras al vi la novtonditaj alpakoĵoj en Grayboo Ranch



... kaj la redakcio de Ora Ĵurnalo!



Por la aŭgusta numero ni bezonas viajn kontribuojn plej malfrue la 10an de aŭgusto.